


Usona **Esperantisto**

Dumonata bulteno • Bimonthly bulletin Vol 48, N° 4 (2009/4)



D-ro Grant GOODALL estis unu el la specialaj gastprelegantoj ĉe la 40-a datreveno de la unua NASK, la Nord-Amerika Somera Kursaro de Esperanto. (Foto danke al Franklin MONTENEGRO-RODAS)

Fotoj kaj raporto pri la 40-a jaro de NASK (pĝ. 4-6)

Ankaŭ ĉi-numere: Eksterlande: *Esperanto en malluksa Afriko* • Instruado: *Elparolo* • En la ĉielo: *Ni esploru la Laktan Vojojn* • Traduk-interŝanĝo el Danujo • Leterkesto: *Ĉu vi jutubas?* • Sporto: *lom da historio kaj iom da fiziko de basbalo* • Recenzo: *Marvirinstrato* • Report from Bialystok • kaj pli...

Usona Esperantisto

Dumonata bulteno • Bi-monthly bulletin

Vol 48, No 4 (2009/4)

Redaktisto • Editor: HOSS FIROOZLIA

Sendu kontribuojn al • Send contributions to:

✉ Usona Esperantisto, c/o Hoss Firooznia
CPU 271205, U. of Rochester
Rochester, NY 14627-1205, USA

✉ bulteno@esperanto-usa.org

Redaktofino por la venonta numero (2009/5):
Editorial deadline for the upcoming issue:

la 20-a de Septembro 2009

★★★

Ni bonvenigas kontribuojn aŭ en Esperanto aŭ en la angla lingvo. Bonvolu aldoni viajn planan nomon, foton kaj (ret)poŝtadreson. Sendante fotojn, nepre informu nin pri la nomoj de fotinto kaj fotito(j), la loko, kaj la dato. Ni perpoŝte resendos materialojn nur se vi aldonas mem-adresitan, afrankitan koverton.

Oni rajtas reeldoni materialojn el ĉi tiu bulteno se oni ĝuste indikas la fonton kaj sendas al la redaktisto ekzempleron de la reeldonita materialo. Opinioj esprimitaj en la bulteno apartenas al la respektivaj aŭtoroj, kaj ne nepre spegulas opiniojn de la redaktisto aŭ Esperanto-USA.

We welcome contributions in either English or Esperanto. Please include your full name, photo, and email and/or postal address. With photos please include the name of both photographer and subject(s), the location, and the date. Materials will be returned by mail only if you include a self-addressed, stamped envelope.

You may republish content from this bulletin if you give credit and send a copy of the reprinted material to the editor. Opinions expressed in the bulletin are those of the respective authors and do not necessarily reflect the views of the editor or Esperanto-USA.

★★★

Centra Oficejo • Central Office of Esperanto-USA

✉ PO Box 1129, El Cerrito CA 94530 USA

☎ 510.653.0998; 2510.653.1468

✉ info@esperanto-usa.org

http://esperanto-usa.org

Direktoro • Direktoro, CO: William B. HARRIS

Prezidanto • President: Philip G. DORCAS

Vicprezidanto • Vice President: Tim WESTOVER

Sekretario • Secretary: Julie SPICKLER

Kasisto • Treasurer: (vaka)

Aliaj estraranoj • Other board members: Jenja AMIS, Mar CÁRDENAS, D. Gary GRADY, Anjo HARLOW, ROS Haruo, Tor KINLOK, Orlando E. RAOLA, Julie WINBERG, Christopher ZERVIC

Hey you... komencanto!

Yes, you! Are you a student of Esperanto who often finds the articles in *Usona Esperantisto* a bit overwhelming? Would you like more features aimed at improving your basic comprehension of Esperanto? If so, I need your feedback: what sorts of new columns would you like to see? Serialized stories in simplified Esperanto? Advanced articles with grammatical help for beginners (e.g., in footnotes)? Intermediate lessons with homework problems? Please send me your suggestions!

Redaktiste via, Hoss FIROOZLIA

Esperanto magazines... for (almost) free!

Each year the Central Office receives extra copies of *Juna Amiko*, *Kontakto*, *Esperanto*, *Heroldo*, *Komencanto*, *La Gazeto*, *Literatura Foiro*, and other magazines.

In August or September of each year, director Bill Harris bundles up packages of these magazines and makes them available to our members as a way to inexpensively sample a variety of periodicals. They're also handy for displaying at local meetings or info tables so newcomers can get a taste of the international *gazetaro*.

Each package contains a copy of five different magazines. The magazines are free, but the shipping cost is \$2.56. One package to a customer, while they last. We also can't guarantee that any particular magazine will be in your package—sorry!

To order, go to the online bookstore at <<http://esperanto-usa.org/retbutiko>> choose the category "Promotional Material", and look for "FREE MAGAZINES".

Or, send a check for \$2.56 to the PO Box of the Central Office (see address at left) and ask for "FREE MAGAZINES".

We need you! Your membership fees help promote Esperanto in the USA and provide services to speakers and students across the country. Members regularly receive this bi-monthly newsletter, the *Membership List*, discounts from the Book Service and online store, access to online resources (mailing lists, blog space, etc.) and discounts at the national conventions. Please join (or renew) today!

Return with payment to: **Esperanto-USA, P.O. Box 1129, El Cerrito CA 94530**

Name: _____

Address: _____

City & State: _____

Postal code & Country: _____

Phone & Fax: _____

Email: _____

Birthdate (M/D/Y): ____/____/____ Ham radio call: _____

In the member list, don't publish my: address phone fax email

Send me info on joining the *Universala Esperanto Asocio*

Check **one** category of membership/support:

Life (*birthdate required*)..... \$800.00

Sustaining..... \$80.00

Family..... \$60.00

Individual..... \$40.00

Youth (*you must be under 27*)..... \$20.00

Limited Income..... \$20.00

Friend of Esperanto..... \$10.00


(not a membership, but you receive 3 issues of the newsletter)

Credit card info: Visa Mastercard

Number: _____ Expires(M/Y): ____/____

fotoj de NASK 2009

Jen kelkaj el la multaj fotoj kiujn faris lernantoj en Sandiego dum la ĵus finiĝinta Nord-Amerika Somera Kursaro de Esperanto. Por vidi pli—kaj por legi artikolojn, poemojn, kaj



eseojn verkitajn de lernantoj, vizitu la NASK-retejon ĉe <<http://esperanto.org/nask>>. (Dankon pro ĉi tiuj fotoj al Franklin MONTENEGRO-RODAS, Ina CENTAUR, kaj Eduard KUSTERS.)



Miaj spertoj ĉe NASK 2009

Por mi estis la dua fojo ke mi partoprenis. Antaŭ du jaroj mi estis en Vermonto. La kunveno estis tiam tiel agrabla ke mi volis reveni. Tamen la distanco de mia hejmurbo Antverpeno (Belgujo) ĝis Sandiego estas ega. Aliflanke la kurzo de eŭro kontraŭ la usona dolaro kompensis iomete la malfacilaĵon.

Kiel ĉiufoje la grandeco de Usono imponis min. Sed ankaŭ la organizado. La sekureco, la amaso de diversaj policistoj kaj kontrolistoj estis iomete konfuzaj. La katastrofo de 9/11 klare kaŭzis multe da laborigo. En la flughaveno de Atlanta oni devis mem preni sian valizon kaj meti ĝin sur la ĝustan ruliĝantan stablon. Denove mi miris pri la grandeco de la bokaloj kaj la malŝparo de manĝaĵo. Nur en la aviadilo oni estis ŝparema kaj ne plu ofertis manĝaĵon dum la pli ol trihora flugado de Atlanta al Sandiego.


Sandiego estis bela, afabla... kaj ankorau kelkaj superlativoj. La plej agrabla estis por mi la klimato. Mi neniam antaŭe spertis klimaton tian: plezura temperaturo, blua ĉielo, venteto. Veninte de la pluvo de Belgujo oni nur povas konstati ke la bonfaro en la mondo ne estas juste partigitaj.

La Universitato de Kalifornio ĉe Sandiego estas ega: 5 kvadratajn kilometrojn. Feliĉe mi retrovis miajn malnovajn konatojn—Vernero kaj Reni—kiuj antaŭe partoprenis NASKon en Vermonto. La parolado rekomenciĝis kvazaŭ ne du jaroj pasis intertempe.

Eduard KUSTERS

Eduard loĝas en Belgujo. Nun emeritulo, li studis medicinon kaj laboris en la ĥemia industrio kaj la universitato de Bruselo.

eduard.kusters@skynet.be



La temo de la kurso estis: “La Islama literaturo kaj Esperanto”. La Korano, Aviceno, Omar KHAYAM... la landoj Egiptujo, Irano, Bosnujo... pasis la revuo. Denove oni spertis la riĉecon de la in-

“Denove oni spertis la riĉecon de la interŝanĝo de ideoj kiam homoj de diversaj landoj... povas komunikiĝi en la sama lingvo.”

terŝanĝo de ideoj kiam homoj de diversaj landoj kun diversaj edukadoj kaj spertoj povas komunikiĝi en la sama lingvo. Nia instruistino, Spomenka, estis brila ne nur pro la enhavo de la kurso sed ankaŭ pro la varma voĉo kaj klara

prononcado. Sed finfine ĉiu kontribuis ion al la sukceso. Plaĉis al mi, ke la estraro uzis unu temon por la tri semajnoj. Tiu elekto donis unuecon kaj samtempe la eblecon por varii.

La ekskursoj al la urbo, la bestoĝardeno, la muzeoj kaj certe la ekskurso al Meksiko certe valoris. Dum la kurso Spomenka uzis la araban proverbon: “Por geamantoj Bagdado ne estas fora.” Tio indikus ke amantoj ne vidas la distancon kiel gravan malfacilaĵon por vidi unu la alian. Mi povas diri la saman pri NASK. ★

Leterkesto

Ĉu vi Jutubas?

En numero 2009/3 de *Usona Esperantisto* D. Gary GRADY atentigis nin pri la multoblan ĉeeston de Esperanto en *YouTube*. Mi kaptu okazon iom pli detaligi tiun ĉeeston.

Youtube estas nova eĝego en la ciber-spaco kiu povas enorme utili al Esperanto, ties diskonigo kaj praktikado. Kaj la afero daŭre moviĝas en la ĝustan direkton. Sufiĉas menci la jusan aperigon de preleg-serioj de Ivo LAPENNA kaj de eroj el NASK 2000. Menciindas ankaŭ la serio "Esperanto estas" (jam aperanta plurlingve) kaj "Pasporto al la Tuta Mondo".

Jam Esperanto ekzistas kritik-amase en Youtube. Tamen negativaĵo estas la abundo de eroj kiuj neniel aŭ tre malmulte rilatas al Esperanto, nur alprenas pro unu aŭ alia kialo la nomon. Tio malfaciligas kalkuli ĝuste kiom da esperantaĵoj estas ajn-momente. Filmetoj pri Esperanto sur Youtube estas tre diverslingvaj, do vera festeno por poligloto, kvankam limigo por

nepoliglotoj. Eĉ estas bonegaj priesperantaĵoj en la kataluna!

En mia juneco por povi aŭdi esperanton mi devis peti kasedojn de ELNA per poŝto. Ekzistis tre bona prunedona sistemo, sed nature, temis pri kelksemajna atendado. Nun la plej diversaj filmetoj spekteblas per nura mus-klako. Mi povus listigi la plej bonajn laŭ mia perspektivo, sed preferinde ĉiu spektanto ciberaventureme mem trovu trezorojn.

Por malgranda lingvo, Esperanto jam estas en Youtube tre abunde reprezentata, signife pli ol aliaj planlingvoj kiel Interlingua kaj Ido, por ne menci tiujn tutnovajn kiuj tiom disfloras nuntempe (kelkaj nur pro hobiaj celoj). Nature, Esperanto povus esti fakte multe pli reprezentata, sed ja nova ero aldoniĝas preskaŭ ĉiutage. La spektanto rimarkos ke mi mem havas kelkajn esperantaĵojn en Youtube (serĉu "peter browne leyendo". Averton: mi ankaŭ legas poemojn en Ido.)

Mia konsilo al leganto de *Usona Esperantisto*: faru filmetojn kaj ĉiam pli da filmetoj pri aŭ en Esperanto, kaj ilin jutubigu. Jen spaco por disfloro de talentoj! La jutubo reprezentas ankoraŭ alian etapon en la evoluo de la komunikado, en kiu oni ofte produktas filmeton reage al alies filmeto, kvazaŭ speco de kinoletero. Mankas tiaj reagoj al la anglalingva prezento de la konata kaj elstara lingvemulo Steve KAUFMAN, kiu asertas ke al Esperanto mankas kulturo. KAUFMAN estas inteligenta, sed li falas en la kaptilon de ŝablona perspektivo.

—Peter BROWNE

Skribu al *Usona Esperantisto*!

La leterkesto estas loko por "libera parolado" kie vi povas komenti pri E-USA kaj reagi al temoj el pasintaj numeroj. Leteroj prefere havu ne pli ol 500 vortojn; ni koncizigos laŭbezone. Bonvenaj estas kontribuoj en Esperanto aŭ la angla lingvo. Skribante al la redakcio, nepre menci ke viaj komentoj estas "por la bulteno".

The letters page is a "free-speech zone" where you can comment on E-USA and respond to topics from previous issues. Letters should be no longer than 500 words each; we'll edit for length, as needed. Contributions may be in Esperanto or English. When writing, be sure to indicate that your comments are "for the newsletter."

Premio-tago en Aguidahoué

[Ĵenja kaj Joel AMIS plusendis ĉi-novaĵon de Francois el Benino. Ili diras: "Li okupiĝas pri bonega bonfara projekto kiu helpas al orfoj kaj

(Daŭrigota sur pĝ. 8)

Elparolo

The French never care what they do, actually, as long as they pronounce it properly.

—Professor Henry Higgins
(in *Lerner and Loewe's My Fair Lady*)

For Americans, Esperanto pronunciation is easier to learn than that of French or many other languages, but that doesn't mean it's trivial. (Just ask William Shatner.) We need to practice and to listen to good examples of spoken language. Thanks to Esperanto radio and podcasts, doing that is easier now than it's ever been. But nothing beats a well-taught class for learning and mastering the spoken form of any language.

For beginning students, the most important thing is understanding and being understood. Duncan Charters's hilariously accurate comedy routine mimicking various national accents in Esperanto isn't just funny; it demonstrates that even heavily accented Esperanto isn't necessarily hard

Leterkesto, de pĝ. 7

stratinfanoj. Ili kolektas lerneajn aĵojn (skribilojn, kajerojn, esperantaĵojn) por premi-tago en Septembro, kaj petas esperantistojn kontribui.]

En Benino estas de kelkaj jaroj lernejoj, en kiuj la neregistara organizo Afrika Centro Mondcivitana (NGO-ACM) instruas Esperanton kaj disdonas premiojn al infanoj. Ĉi-jare la premiotago okazos en la elementa lernejo Aguidahoué la **15-an de Septembro 2009**. Kutime ĝi okazas je la fino de ĉiu lernoĵaro, sed pro somera kurso en Esperanto en la lernejo dum la ferio, ni ŝatus disdoni dum la ferio por kuraĝigi la infanojn je la komenca lerneja jaro. Mod-estaj estos la premioj, sed ĝojigaj.



D. Gary GRADY

Gary is Vice President of the American Association of Teachers of Esperanto (AATE). He lives in Durham, NC.

dgary@mindspring.com

to understand. Students should know the ideal they're aiming for, but they shouldn't get too discouraged if they don't achieve instant perfection.

At the outset, it's best to concentrate on sounds that are most confusing to the listener or most difficult for the speaker.

For English speakers, that means among other things remembering to pronounce vowels consistently. In English we tend to reduce vowels in unaccented syllables to vague "uh" or "ih" sounds, as in "Esp-uh-ran-to." If your students can correctly pronounce the name of the language itself, they're already on the right track. One useful exercise is to write out English phrases and sentences in Esperanto letters

Por faciligi la okazigon de la premio-tago ni petas bonvolemlulojn de la tutmonda esperantistaro subteni per sendado de donacoj. Ĉiuspecaj donacoj daŭre restas bonvenaj. Ni sendos bildkarton por danki la sendintojn, aŭ la infanoj mem skribos la dankmesaĝojn.

Sendu mesaĝojn kaj donacojn al:

Afrika Centro Mondcivitana (NGO-ACM)
BP 226 Lokossa-Mono
Rép du Bénin
West Africa

Kaj por pli da informo, vidu:
<http://sites.google.com/site/revedenfants/esperanto>

and then pronounce them as they would sound in Esperanto—English with an Esperanto accent. This is likely to entertain your students as well as getting them used to the sounds as they ought to be.

Certain letters and letter combinations tend to be mispronounced, and a few others are unfamiliar and hence hard to say.

A common but relatively minor mistake is to pronounce O like the English long O, which would be spelled “ou” in Esperanto (as it’s sometimes spelled when transliterating Chinese names, for example). If students have trouble hearing the difference, it might help to use the example of “or” and “ower.” (English normally uses a pure O before the letter R.)

Somewhat more serious is a tendency, especially among those who speak or have studied Spanish, to pronounce E so that it sounds almost like the diphthong EJ. This can sometimes lead to confusion, and it’s worth emphasizing that the Esperanto E is actually very much like the E in the English word “bet.”

The diphthongs AJ, EJ, OJ, and AŬ give American English speakers no trouble because those sounds are common in English, but UJ and EŬ are unfamiliar. Try having students say “aj, oj, uj” or “taj, toj, tuj” to see the pattern with different initial vowels. Similarly let them practice “aŭ, eŭ” or “aŭ, oŭ, eŭ.”

Of the consonants, Ĥ is probably best learned by imitation. If all else fails, a forceful K or H will probably be understood. The Esperanto R can also be difficult for many and harder in certain locations (at the start of a word, for example, or following T or D). Using an English R isn’t ideal but it’s understandable.

Most beginning Esperanto courses skip

over the subtle differences between the pronunciations of P, T, and K in English and in Esperanto. In English these stops are usually but not always “aspirated”—that is, followed with something like a short “H” sound. To speakers of many other languages this difference is noticeable, but it’s unlikely to interfere with understanding, and in some cases might even help distinguish the sounds from their voiced counterparts B, D, and G.

The consonant combinations that give English speakers the most trouble are KN and SC at the start of words. (Later in the word is fine; we don’t have any trouble saying “MacNab” or “fists.”) One simple trick that helps, especially if the word ends in a vowel, is to pretend to attach the initial K or S to the previous word—for example saying “las ciuro” or “lak nabo” in place of “la sciuro” or “la knabo.”

For more advice on teaching pronunciation, see how it’s done for other languages with sounds like Esperanto’s.

Finally, a follow-up to the last column: Russ Williams notes two good on-line resources I didn’t mention:

- *La Reta Vortaro* isn’t a substitute for an English-Esperanto or Esperanto-English dictionary, but it is a very good free alternative to the *Plena Ilustrita Vortaro*. While it isn’t as complete, it’s excellent for routine use. As a bonus, it has vocabulary lists by subject matter. I remember the address <<http://reta-vortaro.de>> by thinking “reta-vortaro.de Esperanto.”
- You can download a free 12-lesson introductory course, in more than 20 languages, from <<http://kurso.com.br>>. It’s an interactive program that runs on Windows and Linux (but unfortunately not on Mac OS). ★

Second Annual Esperanto Club Report

from Drew Herman, our on-the-scene correspondent at the UK

GDANSK, Poland—The 94th Universala Kongreso de Esperanto ended Saturday in Bialystok, in eastern Poland, and while I alone attended from Alaska, that still qualifies our state as among the proportionally best represented regions of the world.

Bialystok is the hometown of Ludwig Zamenhof, the eye doctor who invented Esperanto in 1887. The honor of hosting the 2009 conference commemorates the 150th anniversary of his birth. While growing up in the multiethnic city during the 1860s and '70s, the studious Jewish boy heard a veritable tumult—a Gemisch, a melange, a gobbledygook, if you will—of languages around him, as his fellow citizens spoke Polish, Russian, Yiddish, German, Latvian and Byelorussian. Zamenhof's ingenious solution to the problem of six languages competing for attention in the same space? Invent a seventh.

On the other hand, Esperanto is easy to learn, culturally and politically neutral, and as capable as any other language of expressing the range of human experience. When it comes to popularization, that counts as three strikes against.

According to the United Nations, 2009 is also the International Year of Reconciliation. Unfortunate timing—Poland's No. 1

brewery, Tyskie, also declared 2009 the International Year of Beer, thus stealing the U.N.'s thunder. Participants at the Esperanto Congress made every effort to honor both celebrations.

The declared theme of the congress was a modern re-evaluation of Zamenhof's ideas about mutual understanding and toleration, goals he hoped to further with his new language. In case you wondered, the 1,860 people who showed up decided we're still for that stuff.

But as impressive as that attendance number is, it doesn't quite live up to the "universal" part of the congress title. Indeed, as far as I could tell, this year's event suffered from the same problem as the previous 93, with not a single representative from off-planet, let alone outside the Solar System. Oh, well.


Still, on the principle that we will welcome any aliens

who do make the trip, the 2010 congress in

Havana will also be called "universal". In

this respect we are more up-front than the sponsors of

the Miss Universe Pageant, who don't even send invitations to Mars or Venus, in an obvious move to keep the home-planet advantage. I can hardly wait till a sentient green cloud from Alpha Centauri calls their bluff, sings all four solo parts from the "Ode to Joy," then blows away Miss Brazil in the swimsuit competition.



Within our movement, some admit to doubt about what we call the “final victory,” the day when everybody in the world will supposedly use Esperanto as a second language. These Esperantists just make the most of the movement’s own microculture of networking, literature, hobby clubs and wearing little green star pins on their lapels.

I suppose I’m in that group, but I do what I can for diffusion. During the congress, I took the intermediate Esperanto competency certification exam endorsed by the European Commission, and therefore recognized in every country of the world except the United States. But I figure it all works out, because even where they do recognize it, it doesn’t entitle you to anything.

Meanwhile, I’ve read some good books, and I have connections good for free lodging all over the world. The Esperanto movement even issued its own currency, the “stelo,” or star, in 1959. I have examples of coins in the 1, 5, 10 and 25 steloj denominations in uncirculated condition—as are all stelo coins. At the current rate, one stelo can be exchanged for another stelo.

Esperanto youth culture appears particularly vigorous, in a wholesome, make-friends-around-the-world-and-sing-Pete-Seegery-stuff-in-translation kind of way. Kids who learn Esperanto also have an easier time learning other languages later (true fact).

Indeed, my informal census in Bialystok reinforces observations I made last year at the Pan-American Esperanto Conference in Montreal. It looks like Esperantists are either in their teens or retired. OK, maybe the people of working age just had to work all week.

I credit the return to our traditional recruitment method for the resurgence among the younger set. Apparently our ill-conceived, friendly cartoon character, Esperanto Asparagus, reminded people of a gangrenous finger, and has now retired. So we’re back to hiding around the corner from playgrounds with textbooks and dictionaries strapped inside our trench coats.

“Pssst. Hey, kid, wanna learn Esperanto?”

What’s my point? Learn a new language—it keeps your brain from shriveling.

And, as always, “Qapla’!” ★



**MI VOLAS, KE VI
KONTRIBUU AL
USONA ESPERANTISTO!**

Aŭskultu Onklon Zam kaj sendu viajn fotojn, recenzojn, artikolojn, raportojn kaj leterojn al la redakcio ĉe <bulteno@esperanto-usa.org>.

Elstare imagoplana verko

Ne ofte estas eldonataj libroj tiom altkvalitaj, kiom *Marvirinstrato*, en kiu ajn lingvo; mi tre feliĉas pro tio, ke Tim WESTOVER verkis ĝin en Esperanto, donante al mi ne nur la plezuron legi ĝin sed ankaŭ la ĝuan sperton recenzi ĝin.

Trajto kiu tre plaĉas al mi estas tio, ke la libro ne havas la kutiman aspekton de novelaro, kies enhavoj estas tute hazardaj kaj neligitaj. Dum mi legis, mi sentis ke la rakontoj okazis en bela, vivanta mondo kreita de le aŭtoro menso—aŭ pli precize, en du mondoj.

Marvirinstrato enhavas dek ok rakontojn, reklamojn, kaj fabelojn. La unuaj dek kvin ŝajnas al mi—studento pri hispanlingva literaturo—similaj al la fama ĝenro “Magia Realismo”. Multaj okazas en stranga(j) urbo(j), kaj eksterordinaruloj ĉefrolas en preskaŭ ĉiuj. Fininte la dekkvinnan novelon, mi sentis kvazaŭ mi ĵus legis aron de artefaritaĵoj kiu magie aŭ sciencfikcie venis el paralela mondo kie ekzistas mirakloj—kaj kie almenaŭ unu mondoparto parolas Esperanton. Kvankam la aŭtoro mencias nenion—vere, li eĉ ne mencias ĉu oni parolas Esperanton—li



Brandon SOWERS

Brandon estas 23-jaraĝa membro de E-USA, TEJO kaj SAT. Li studas la hispanan kaj portugalan filologiojn ĉe UC Davis, kaj li ĵus partoprenis la 44-an Brazilan Kongreson de Esperanto.


sowers.brandon@gmail.com

ludas kun la legantaro kaj lasas ke oni supozu. Mi ŝatus legi la opiniojn de aliaj legantoj.

Ankaŭ la lastaj tri noveloj ŝajnas formi integran tuton; ili estas pli realismaj, ne temas pri magiaj eventoj nek urboj kie oni (ŝajne) parolas nian lingvon. La unua temas pri sperto de fremdulo, verŝajne Esperantisto, en la suda regiono de Usono. Same kiel la aŭtoro, mi loĝis en tiu regiono dum jaroj kvankam mi ne estas sudulo, kaj mi povas ĵuri, ke li bone kaptis kiom rava kaj neordinara ĝi vere estas.

La finaj noveloj pritraktas nian karan Esperanto-movadon, ne tre pie tamen des pli amuze. Unu temas pri la heredaĵo de riĉa sentaŭgulo kiu mortas tuj post fasciniĝi pri samideanino; la alia, pri disputoj kiuj leviĝas post malkovro de verkaro de nekonata Esperantisto.

Ĉi tiu imagoplana libro meritas lokon en la libraro de ĉiu legema usona esperantisto. Laŭ mia vidpunkto, ĝi estas bona ne nur kompare kun la klasikaĵoj de la Esperanto-literaturo; se ĝi estus verkita en nacia lingvo, multaj kritikistoj taksus ĝin vere elstara. Aĉetu ĝin nun kaj, post jaroj, vi povos montri al novbakitaj esperantistoj (kiuj sendube devos legi ĝin dum NASK) ke vi aĉetis dum ĝi estis ankoraŭ varma de la unua presado. ★



Marvirinstrato.
Originalaj Noveloj
en Esperanto.

Tim WESTOVER.
(Literaturo.net,
2009. 209 p., \$13)

Por pliaj detaloj,
vidu la dorsan
flankon de ĉi tiu
numero aŭ vizitu la
retejon de la libro:
marvirinstrato.com

Esperanto en malluksa Afriko

La kresko de la esperantistaro en kelkaj tre malriĉaj landoj montras ke Esperanto ne estas nur luksaĵo praktikata de intelektuloj en riĉaj landoj. Statistikoj mankas, sed se dedukti el la novaĵoj en *Esperanto en Afriko*, bulteno de la Afrika Komisiono de UEA, la kursoj multobliĝas dum la lastaj jaroj en Togolando, Benino, kaj Burundo. Dume en Malagasujo, Angolo, Niĝerlando kaj Ebura Bordo (kelkaj ankaŭ diras “Kotdivuaro”) la organizaĵoj de esperantistoj estas bone establitaj kun kongresoj, kursoj, ekzamenoj ktp.

En pasinta Januaro Svetlana MILANOVIĆ kaj mi mem instruis kursojn por komen-cantoj kaj progresantoj en Burundo, ĉe la lago Tanganjiko, unu el la dek plej malriĉaj landoj en la mondo. Ni suferis malluk-secon, maleston de taŭgaj nutraĵoj, noktan bruadon kaj malpurecon, sed ni hontas diri tion, ĉar la periodo de suferado por ni estis nur unu monato, do pli bone plendu pro la daŭraj suferadoj de la afrikanoj ol pro la propraj nekonvenaĵoj.

Ĉar la entuziasmo por niaj kursoj estis ege granda, ni engaĝiĝis ne nur bone instrui ilin, sed ankaŭ trovi manierojn por helpi organizi ilian asocion. Pro la malriĉeco, kotizado de membroj de kluboj estas nepraktikebla. Jam kurslibrojn la burundanoj ne povas aĉeti kaj se iu havas kurslibreton, ĝi estos baldaŭ ĉifonita pro eluzado tra multaj fingroj, pro manko de bona formetujo, ekzemple libroŝranketo.

Kion fari? Ni elpensis kaj decidis helpi starigi Esperanto-centron, kie la lokaj esperantistoj povos renkontiĝi, kie estos gardataj Esperanto-libroj kaj kie, por havi

Johan DERKS

Johan laboras kun *Esperanto en Evoluo*, senprofitcela fonduso kiu subtenas Esperanton en malriĉaj landoj.

derks.esp@tiscali.nl



enspezojn, estos komputiloj kun ret-aliro por la paganta publiko. La konstruado de la centro devos esti financata pere de monvarbado inter pli riĉaj esperantistoj en la mondo.

En la pasinta jarduono ni fondis fondaĵon “Esperanto en evoluo” kun propra retejo, kiu celas ne nur helpi financi la Esperanto-centron en Burundo, sed “ĉiujn profitodonajn projektojn en malriĉaj landoj, kiuj celas doni bezonatan financon bazon al la tiea Esperanto-movado”—tiel tekstas la statuto.

Nia kampanjo komenciĝis dum la Universala Kongreso, kun ankoraŭ nekonata sukceso, sed certe la burundaj esperantistoj bezonas ankaŭ financon helpon de legantoj de *Usona Esperantisto*.

Se vi volas scii pli, vizitu nian retejon ĉe <http://esp-evoluo.tk>, kie vi konatiĝos kun la internacia estraro, la urbo Rumonge—kie la Esperanto-centro estas planita—kaj kun niaj amikoj tie. ★

[*Noto: Se vi volas helpi sed mankas al vi ret-aliro, vi povas atingi s-ron DERKS en Nederlando telefone: +31-383311567.*]

Responde al nia peto por fremdlingvaj tradukoj, niaj kolegoj ĉe la redakcio de la Dana Esperanto Asocio proponis al ni multajn. Jen nur du — ambaŭ el la 19-a jarcento. Multan dankon al s-roj Jens Stengaard LARSEN kaj Lars KROMANN pro ilia afabla helpo. Por legi pliajn tradukojn de danaj klasikaĵoj, vizitu la retejon: <<http://heredodana.dk>>.

Soneto de Alma

Verkis Frederik PALUDAN-MÜLLER

Tradukis H. E. JENSEN

Al mi vi kaŭzis strangan penskombinon.
Vi min demandis: kiel fartus mi,
se novajn pensojn nun ekhavus vi
kaj trovus al vi novan fianĉinon,
se via kor' ne ŝatus pli da vinon
de l' amo—refreŝiga estas ĝi!
kaj antaŭ la edeno starus mi
kaj vidus de l' feliĉo nun la finon.

Aĥ, se dolore venus la deklaro,
se, kiel sago kun siblanta sono
en mia brusto trafus min la sort',

mi certe fartus kiel violono:
rompita donas ĝi—post la riparo—
pli belan tonon—kun malpli da fort'.

Amikoj en la mizero

Verkis Steen Steensen BLICHER

Tradukis H. E. JENSEN

En rosobrila matena horo
en la herbejo sidis leporo.
Kaj ne ĝi pensis pri danĝero,
ĝi estis en amika sfero
de bravaj bovoj kaj ĉevaloj,
kaj ĉiuj laŭ diversaj skaloj
salutis ĝin, kaj la kaprinoj
kaj ŝafoj jesis per kapklinoj,
kaj tute prave—vere la lepor'
kun sia gaja, pia bonhumor'
nun ĝuis rekompence belan laŭdon
pro siaj virtoj tiun jaŭdon.

Subite pafoj, krioj sonas,

bojado, kiujn ĉiu konas!
Rapide la leporo fuĝas
al la cevalo, kiu kuŝas:
“Ho, helpu min, mi petas vin!”
ĝi krias, “kara, portu min
for de la loko nur distancon,
la hundoj perdas do la ŝancon!”
“Mi tre bedaŭras vian faton—
al vi mi sentas nur kompaton”,
respondas la ĉeval', “cetere
mi certe scias, ke vi vere
tre grandan amikaron havas,
la vivon vian ĝi volonte savas.”

Nun al virbovo la leporo
sin turnas. Sed en ĝia koro
troviĝas nur ĉagrena pento
pro lasta la amika sento!

Al kapro nun la besto kuras,
sed li kun granda ĝemo ĵuras:
Li en la kor' doloron sentas,
sed sian mastron ne ofendas.
Kaj lia mastro la ĉasisto estas—
pro tio li pasiva restas.

Kun malespero en la koro
al pia ŝafo iras la leporo.
“Rifuzas ĉiuj!” nur la ŝafo diras,
“pri la kialo mi profunde miras!
pro certa kaŭzo ili ne vin savas,
kaj mi la saman kaŭzon havas.”

Pri helpo la bovinon nun ĝi petas.
Sed la bovin' la jenajn vortojn ĵetas
al la leporo: “Kara, mia koro
al vi rifuzas kun doloro!
Pro via sorto sentas mi malĝojon—
sed iam iros ni la saman vojon—
ni mortos ĉiuj pro mortigaj vundoj!
Adiaŭ, kara mia!—Jen la hundoj!”



Ni esploru la Laktan Vojon

Dum Julio, Saturno malaperis en la vesperan krepuskon. Dum Oktobro ĝi pene grimpos en la matenan ĉielon por tie renkonti la rapide sinkantajn Merkuron kaj Venuson. De la **5-a ĝis la 16-a** ili kune dancos en la orienta ĉielo, ĵus antaŭ sunleviĝo. Fine, la maldikega, preskaŭ nova luno vizitos la triopon matene la 16-an (*dekstre*).

Rigardu la spektaklon ĉiutage por vidi kiel Venuso kaj Merkuro povas rapidi tra la ĉielo. Antaŭ 400 jaroj Johannes KEPLER konstatis, ke ju pli proksima al la suno, des pli rapide planedo orbitas. Plej proksima al la suno estas eta Merkuro, kies ĉirkaŭiro daŭras nur 88 tagojn. La **8-an matene** ĝi aperos tuj apud Saturno—ilin apartigos nur larĝo de etfingro. Nur kvin tagojn poste, la **13-an**, Merkuro troviĝos tuj apud Venuso.

Septembraĵoj estas oportunaĵoj por vidi la centran parton de nia galaksio, la “Lakta Vojo”. Rigardu la sudan ĉielon unu horon post sunsubiro dum senluna vespero (*ekzemple la 15-a; vidu sube*), prefere en malhela, kampara loko. Malalte en la ĉielo vi vidos la konstelacion Sagitario, proksimume du man-larĝojn maldekstre de la brila ruĝa stelo Antareso, en Skorpio.

matene, la 16-an de Oktobro

ĵus antaŭ la 7-a horo



En greka mitologio, Sagitario estis centaŭro (ĉevalo-homo), sed laŭ multaj homoj lia konstelacio aspektas kvazaŭ “te-kruĉo” kiu elverŝas sian teon dekstren.


Dekstre de la “elfluilo” de la tekruĉo situas la centro de nia galaksio, vastega disko kun miliardoj da steloj—inkluzive, kompreneble, nian sunon! Ĝi estas tiel larĝa, ke eĉ lumo bezonas pli ol cent mil jarojn por iri de unu flanko al la alia.

Tiuj neimageble multegaj steloj kreas palan, nebulan zonan trans nia ĉielo (*indikita per streketo-linioj sube*). Dum jarmiloj, la naturo de tiu “lakta vojo” restis mistero; ĝia nomo, *galaksio*, efektive devenas de la greka *gala* (“lakto”). Kiam Galileo unuafoje observis ĝin teleskope antaŭ 400 jaroj, li malkovris vastegajn stelosvarmojn.

Vidate tra binoklo, la regiono de Sagitario estas riĉega. Kial ne esplori ĝin? ★

vespere, la 15-an de Septembro

je ĉirkaŭ la 21-a horo



Iom da historio kaj iom da fiziko de basbalo

Basbalo (aŭ “baspilkado”) estas tre populara sporto en Usono, sed ĝi estas ludata en multaj landoj. “Besuboru” jam prosperis dum ĉirkaŭ jarcento en Japanujo kaj la “homu ran” estas tiom parto de la japana kulturo kiom sumoo, kabuko, kaj suŝio. Basbalo estas tre populara ankaŭ en la kariba regiono, en orientaziaj landoj laŭrande de Pacifiko, kaj en Kanado, Kubo, kaj Dominiko.

Iom da historio

Basbalo, kiel Usono mem, evoluis el brita antaŭaĵo en unikan kaj sendependan kutimon. Ĝi devenis el la neformala formo de kriketo nomita “rondkuro”, kiun oni ludis en la nordamerikaj kolonioj ekde la mezo de la 18-a jarcento. Oni jam nomis ĝin *Base-Ball* (“bazo-pilko”) en libro por infanoj en 1744. Usonanoj ekludis basbalon en la frua 19-a jarcento, kiam neformalaj teamoj uzis lokajn regulojn. Dum la 1860-aj jaroj la sporto, senrivale populara,



Barry FRIEDMAN

Barry estas esperantisto jam de preskaŭ 20 jaroj. Li ŝatas basbalon, lingvojn, kaj manĝojn pasto-ringojn.

**bfriedma@chemistry.
ohio-state.edu**

jam estis vortpentrita kiel la “nacia distraĵo” de Usono.

En 1845, Alexander Joy CARTWRIGHT kreis la formon de la moderna basbaloludejo. Kun anoj de sia teamo *Knickerbocker Base Ball Club* li elpensis la unuajn regulojn de la moderna ludo. La unua oficiale registrita ludo okazis en 1846 kiam lia teamo malgajnis al la teamo *New York Nine*. La ludo okazis ĉe Elysian Fields en Hoboken, Novjorzejo. En 1858 la unua nacia asocio de basbalo-ludantoj formiĝis. En 1869 la *Red Stockings* de Cincinnati fariĝis la unua salajrita basbala teamo. En 1871 la unua profesia ligo establiĝis, kaj en 1876 la unua ĉefa ligo, la Nacia Ligo, formiĝis. En 1878, Frederick Winthrop THAYER de Masaĉuseco, kapitano de la teamo de la universitato Harvard, ricevis patenton por kaptanto-masko. En 1884 oni ludis la unuan “Mondan Serion” de ludoj.

En 1885, usona prezidento Grover CLEVELAND malakceptis inviton ĉeesti ĉefligan ludon, dirante “Kion vi imagas, ke la usona popolo opinias, se mi malŝparus mian tempon ĉe basbala ludo?” Li malgajnis en la balotado de 1888 al Benjamin HARRISON, kiu poste fariĝis la unua enofica prezidento ĉeesti tian ludon.



Folio el *A Little Pretty Pocket-Book* de John NEWBERRY, 1744

Dum sia prezidenta kampanjo en 1920, re-spublikana kandidato HARDING petis helpon de Babe RUTH por kontraŭi la subtenon de Ty COBB al la guberniestro de Ohio, James COX.

“Infero, ne”, diris RUTH. “Mi estas demokrato.” Poste li aldonis, “Kiom ili proponas?” La sumo estis \$4000, sed ĉiaokaze li ne donis helpon al HARDING.

Dum la dua mondmilito, Franklin D. ROOSEVELT diris al basbala komisiisto Kenesaw Mountain LANDIS, ke la ludoj devas daŭri. LANDIS do rapide plimultigis la dumnoktajn ludojn por ke fabrik-laborantoj povu vizitadi.

Iom da Fiziko

La ŝtato staras malpli ol 20 metrojn for de la batanto, kaj ŝetas pilkon je rapido de proksimume 40 metrojn sekunde. Dum tiu tempo la pilko falas proksimume 1,2 metrojn de sia “rekt-linia” vojo. Cetere, la kudreroj sur la pilko kreas multan aertumulton, ŝanĝante ĝian vojon kaj vertikale kaj horizontale. Por pligrandigi tiun efikon, ŝtato ofte aldonas ekstran rotacion. La pilko do kutime rotacias proksimume 20 fojojn dum sia vojo. Tial ĝi povas deŝoviĝi ĝis 44 centimetroj horizontale de la rekta linio, kaj la plimulto de tiu moviĝo okazas nur dum la lasta kvarono




Foto de Tage OLSIN

de la vojo! Oni ankaŭ konsideru, ke pilko travojaĝas tiun kvaronon dum proksimume $\frac{1}{6}$ da sekundo—malpli da tempo ol tiom, kiom bezonas batanto por svingi. La batanto do devas komenci sian svingon antaŭ ol la pilko komencas montri multan horizontalan moviĝon.

Se batanto misjuĝas la rapidon de pilko, lia svingo estos aŭ tro frua aŭ tro malfrua. Kaj se li misjuĝas la alton de pilko, lia svingo estos aŭ tro alta aŭ tro malalta. Pro tio, la batado de pilko per batilo fare de batanto estas tre malfacilega!

Unu el la plej sukcesaj batintoj estis Ted WILLIAMS, kiu diris: “50% de la batado estas super la ŝultroj.” Kaj Yogi BERRA, unu el la plej amuzaj ludantoj, diris: “90% da basbalo estas mensa, kaj la alia duono estas fizika!” Nepre ambaŭ pravas! ★



Formo de modernstila balbalo-ludejo

krucvortenigmo

Ni lotumos unu premion inter la solvintoj: \$10 da rabato ĉe la libroservo de Esperanto-USA. Ĉiuj membroj rajtas partopreni. **Via solvo alvenu al la redakcio (aŭ poŝte aŭ rete) antaŭ la 20-a de Septembro.** Bonan solvadon!

Horizontale

- 1 Prezidanto antaŭ Renato
- 4 ___eroj kaj stoploj de William AULD
- 8 "Je via ___!"
- 12 Pronomo
- 13 Griza; plena je senintereso
- 14 Ŝtatestro titol' en Kuvajto aŭ Katara
- 15 Mont' aŭ alta zon' kun someraj paŝtejoj
- 16 Kaŭzanta lacecon aŭ senton tian, kia en 13 horizontale
- 17 Fazeoloforma organo, kaj urbo en Nevado
- 18 Paŝado sur la ruĝa planedo?
- 21 Li ŝvebas kiel papilio, pikas kiel abelo
- 22 Esperanta literumado de la nomo "Cseh"
- 23 Indikil'; kun unu el 32 vertikale, ĝi fariĝas supera sci'
- 26 Interna parto de la kolo, per kiu oni glutas kaj spiras

1	2	3		4	5	6	7		8	9	10	11	
12				13					14				
15				16					17				
18				19					20				
				21				22			23	24	25
26	27	28				29					30		
31					32				33				
34				35				36					
37				38			39						
				40			41				42	43	44
45	46	47				48					49		
50						51					52		
53						54					55		

- 29 Kapitan' KIRK, por William SHATNER
- 30 "Zorgu pri vi, kaj nenion ___."
- 31 "Unu floras, ___ ploras."
- 32 Er-ara ligil'?
- 33 "Vizaĝo sen kulpo, sed koro de ___o."
- 34 Legom' kun ruĝa, manĝebla radiko

- 35 Bird' kun granda, ventumilforma vosto
- 36 Elbuŝigas
- 37 Kvanto nedifinita
- 38 Kolektiva sufikso
- 39 Ne pli ol
- 40 Kaŝa forkapto de esperanta emblemo?
- 45 Glate kaj seninterrompe, kiel rivero

- 48 Eligi videblajn radiojn
- 49 "Tute libera, kiel birdo ___a."
- 50 Antaŭa nomo de E-USA
- 51 Lakteblanka aŭ blueta juvelŝton'
- 52 Interplektaj' kunliganta, ekz. inter ŝulaĉoj
- 53 Rifuĝej'


- 54 Elemento № 53, uzata en solvaĵo fare de kuracistoj
- 55 Grupmembro
- Vertikale**
- 1 "Eĉ muŝo sentas, ___ vi ĝin turmentas."
- 2 "___ poŝo 24 vertikale buŝo."
- 3 Ofte trovata kun sal'
- 4 Ŝerca, infaneca, maliceta ago farita pro ludemo
- 5 Sangomank'
- 6 Hebrea; kun unu el 32 vertikale, temus pri batalarto
- 7 "Se vi prenis violonon, prenu ankaŭ _____."
- 8 Flava likvaĵo, parto de sango
- 9 "...sed ege vin surprizus, ke li salutas ___ kiel parenco viajn jugintojn tute same." (AULD)
- 10 "Bone sukcesu, sed ankaŭ ___ ne forgesu."
- 11 "___ estas pli peza ol fero, pli malpeza ol aero."
- 19 "Lernu juna, por esti ___ maljuna."
- 20 Eksteraj'; sen unu el 32 vertikale, ĝi fariĝas rajdobesta seĝ'
- 23 Postsign'
- 24 Vidu 2 vertikale
- 25 Pulvorigita kalka ŝton', uzata por tegi murojn
- 26 KOSIARSKA de Pola Radio
- 27 Fluaĵo tre ŝatata de la Stana Lignohakisto
- 28 En versfarado, regula altern' de akcentaj kaj neakcentaj silaboj
- 29 Imag' de feliĉigaj, dezirataj aferoj
- 32 Ili diferencigas duonojn de 18 kaj 40 horizontale
- 33 Bona inklin' de la animo
- 35 "Ne batalu ___' el tero kontraŭ kaldrono el fero."
- 36 Ŝprucigilo
- 39 Hom' kiu migras laŭ sezonaj ŝanĝiĝoj
- 40 "___ hundo mankas nenio, ĝin atakas rabio."
- 41 "Ne ĉio griza estas _____."
- 42 Antaŭa nomo de 50 horizontale
- 43 Amik' de la Stana Lignohakisto
- 44 "Kie regas konkordo, regas _____."
- 45 Rilate al magia homforma estajeto kun insektecaj flugiloj
- 46 Okazos en Dec. la 150-a datreveno de lia naskiĝo
- 47 Federaj'

Korespondon deziras

TEA, PO Box 3, Tangshan Hebei, 063000 CHINA

Ni estas Tangshan-a Esperanto-Asocio. Por memori la 150-an naskiĝtagon de Zamenhof ni aranĝos ekspozicion en la fino de 2009 kun uzitaj kovertoj de diversaj landoj. Ĉu vi povas sendi al ni kelkajn poŝtkartojn kaj uzitajn kovertojn de via lando? Ĉu vi povas helpi nin? Se vi bezonos ion de nia lando, ni povas sendi al vi.

Hazarda Esperanto



Teksto trovita surflanke de kamiono en Miĉigano. Foto danke al Christopher ZERVIC.


Novaj varoj ĉe la libroservo

All books listed can be ordered online at <http://esperanto-usa.org/retbutiko> or by mail from Esperanto-USA, PO Box 1129, El Cerrito CA 94530. For some titles with multiple stories or songs, more complete information about contents can be found at our website. If a title is out of stock, you can request that the online bookstore notify you by email when the item is available. Thanks largely to fluctuations in the value of the dollar, all prices are subject to change without notice.



ESPERANTO MINI-COURSE Esperanto-Asocio de Britio

This pocket-size booklet will take you through the basics in ten lessons. 100 short sections offer explanations and exercises: all you need to know to begin using the language. When you've worked your way through, try the two reading exercises and the translation exercise! 32 p. Paper. Barlaston. **\$1.90**




CONCISE ENCYCLOPEDIA OF THE ORIGINAL LITERATURE OF ESPERANTO. Geoffrey SUTTON. This English-language encyclopedia contains:

- a preface by Dr. Humphrey Tonkin, Professor of the Humanities and President Emeritus at

the University of Hartford

- a general introduction to Esperanto literature, its history, evolution and modern development
- individual introductions to the five periods of the literature
- over 300 individual articles on the most important writers and their work in chronological order, with biographies and critique
- sample literary texts from some of the best original authors
- an introduction to the language itself, its linguistic structure and creative capabilities
- extensive bibliographies and index. 728 p. Mondial. New York. **\$65.10**



MARVIRINSTRATO

Tim WESTOVER. Eighteen original short stories in Esperanto by an American author. Three have won prizes in the "Prose" branch of UEA's Belartaj Konkursoj. Per bildoj el mondo iom nekutima, la aŭtoro respegulas karakterojn de la ĉiutaga vivo. 209 p. Lawrenceville.

\$13.00



BELETRA ALMANAKO № 2

Prezentas originalajn verkojn de, inter alie, Filipino DORCAS, Carmel MALLIA, Alejandro COSSAVELLA, Reinaldo Marcelo FERREIRA, Benoit PHILIPPE, Baldur RAGNARSSON, Mao ZIFU, Humphrey TONKIN, Trevor STEELE, Paul GUBBINS

kaj Stefan MACGILL; kaj tradukojn fare de Tomasz CHMIELIK, Mao ZIFU kaj Maurice WITTENBERG. Krome recenzoj k.a. materialo. 148p. Mondial. Novjorko.

\$12.40



CLASSIC GREEN STAR PIN

Lapel pin: Round, white enamel with green star, gold border, clutch, for lapel. Diameter 13mm. USA. **\$1.50**